



HOMOJ NI ESTAS
KAJ NENIGRUMA
ESTAS AL NI FRENTO

TRA LA MONDO IRAS FORTA VOJO
PER FLUGILOJ DE FAKTA VENTO

Kulturaj Kajeroj

É MAHÉ →

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : H. MICARD, Prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, ÉPINEUX LE SEGUIN (Mayenne) - Tél. 1 - (Francujo)

JARABONO :

Sendotaj al : Micard Henri
Kulturaj kajeroj
Bonfara : 10 fkoj } Epineux-le-Seguin (Mayenne)
C. C. P. Nantes 2349-62
(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

MARTO - APRILO

1965

2

KULTURAJ KAJEROJ

1965

Marto - Aprilo

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 5, boulevard Buisson
Rochefort-sur-Mer (Franc.)

Komitatanoj :

Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

EN H A V O

Stranga Besto.

Esperanto tra la mondo.

El ie en la mondo

La vivo en Laponio (III) K. Vaatanen.

De preleginto en Gresillon

Pri arto (I) Drs Roose

La Tours-lando kaj ĝiaj medicinistoj (II)

Pro ARON (esp. Dro Dumas).

Aktualaĵo :

Ku Klux Klan.

Kelkaj francaj realigajoj.

Fantazaĵo.

Memoraĵo (fino) H. Chavan.

Por via distro.

Nia konkurso.

Gramatiko per bonhumoro.

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

H. MICARD.

Stranga Besto

La granda zoologo Stelo Verdamo jam de pluraj jaroj dediĉis sian tutan tempon al la vivo de stranga besto, kiu pli kaj pli svarmas sur la terglobo. Antaŭ kelkaj semajnoj li publikigis la konkludojn de sia longa laboro en formo de libreto titolita : « Evoluo de la vivo de la Esperantistus Gigantus ». Pri kio temas ?

Ŝajnas ke la ĉefaj karakteroj de tiu besto ekzistis jam de longe en la Homo Sapiens, alia besto, kiu de miloj da jaroj regas sur la tero. Sed tiuj karakteroj ne kapablis sin montri tre klare dum jarcentoj pro tio ke mankis al ili la favoraj cirkonstancoj kaj la forto kapabla enkorpiĝi tiujn disajn karakterojn. Ĉar la karakteriza trajto de tiu besto estas pacamo. Tiu originala trajto ne povis disvolviĝi en mondo regata de « homo sapiens » — bestoj el kiuj ĉiu oni posedis sian propran « saĝecon » kaj provis ĝin perforti al la aliaj, tiamaniere ke la tuta monda bestaro estis samtempe saĝa kaj malsaĝa. Fine nur antaŭ kelkaj dekoj da jaroj aperis tiu tute nova, originala speco de besto, la Esperantistus Gigantus. Ĝi fariĝis aparta speco pro tio ke aperis nova elemento de unuigo de la disaj karakteroj, elemento kiun la eminenta zoologo nomas : « samlingveco ». Dank'al tiu unuiga forto la bestoj, kies pacamo ĝis tiam ne trovis komunan ligilon, subite kons-tatis, ke ili ne plu vane agitis siajn antenojn, sed ke aliaj respondis al ili per samaj anten-movoj. Kaj oni konstatis fenomenon plej stran-gan ĉefe pro la rapideco de ĝia apero : la

koloro de la haŭto de tiuj bestoj ŝanĝiĝis ; antaŭe blanka, nigra, flava, ruĝa ĝi fariĝis verda kaj, mi-riga afero, sur la brusto de ĉiu besto aperis verda stelo sur blanka disko. La eminenta zoologo in-sistas pri la maniero laŭ kiu reproduktiĝas la Esperantistus Gigantus. Tre ofte la idoj ĉe la nas-kigo ne estas verdaj ; ilia haŭto estas blanka, nigra, flava aŭ ruĝa. Post pli malpli longa tempo ĝi ĝenerale fariĝas verda. Sed la plej stranga fe-nomeno estas, ke eĉ aĝaj bestoj post kontakto kun la unuiga elemento « samlingveco » alprenas la verdan koloron kaj ankaŭ la plimulton el la komunaj karakteroj kaj fakte fariĝas veraj « Es-perantistus Gigantus ». Prof. Verdamo ankaŭ ri-markis, ke kelkaj « Esperantistus Gigantus » per-das siajn specajn karakterojn kaj sian koloron. Li pensas ke tiu modifo devenas de malsano, kiun li ĝis nun ne povas difini, kiun li nomas « dees-perantiĝo » kaj opinias devenanta de la jenaj disigaj elementoj : brilodeziro, helpemo-manko aŭ tro granda nombro de memamo-elementoj en la sango, aŭ tuta manko de luktemo en la cerbaj ĉeloj.

En sia konkludo la eminenta profesoro diras ke li esperas poste verki duan volumon pri la evoluo de la Esperantistus Gigantus ĉar ŝajnas ke tiu evoluo akceliĝas. Li antaŭvidas tempon, kiam la tuta bestaro verdiĝos, kiam ĉiuj antenoj en la mondo ne vane agitiĝos.

Unu el la Strangaj bestoj.



NE AGU KIEL TIU SINJORO

PAGU VIAN ABONON

ABONIGU AMIKON EL NEPAGIPOVA LANDO

Adreso :

Kulturaj Kajeroj

H. Micard, Epineux-le-Séguin (Mayenne) - Francujo

aŭ la peranto en via lando

(vidu liston sur la lasta kovrilpaĝo).

Esperanto tra la Mondo



DUM LA SOMERO

— Dua internacia feriosemajno de Bulgara esperanto-junularo, ĉe la Nigra Maro, en Primorsko (20a-31a de julio). Bulgara Esperanto-Junularo, p. k. 587, Sofia.

— Kampadista Semajno, en Balaruc-les-bains (Hérault), Francujo. (12-19a de julio). Informoj : Sro L. Lentaigne, 3, avenue de la Gailarde, Montpellier (Hérault), Francujo.

— Ni memorigas : « Interrilata Centro internacia de la esperantistaj kampadistoj » eldonas propran bultenon. Adreso : Sro René Laval-lée, 63, avenue Carnot, Caudéran (Gironde), Francujo.

— Eŭropa Ferio-Semajno en Svislando ĉe-Lugano, 22-28a de aŭgusto. « Esperanto » Pf. 417, OH 5001, Aaran (Svisujo).

— Internaciaj Feriaj Esperanto-kursoj, en Helsinĝo (Danujo) 18-25a de julio, Sro L. Friis, Ingemannsveg 9, Aabyhøj, Danujo.

— « Esperanto-Camping » en Hungario, ĉe la bordo de la rivero Tisza, en departemento Szolnok (loĝado en dometoj por kvar personoj aŭ en propraj tendoj). Skribu al Esperanto-grupo, Sagvari-Kulturdomo, Szolnok, Hungario.

— 13a Internacia Ferio-Semajno en Krommenie, Nederlando (8-16a de aŭgusto). Sino J.A. v.d. Meulen-v. Harten, Popolsti 13, Krommenie, Nederlando.

— 5a Internacia Geografia Semajno, en montara regiono de Pollando (18-25a de julio). I.C.S., str. I Maja 51-52, Jelenia Gora, Pollando.

— Internacia Junulkonferenco de la Fondajo Anne Frank, Amsterdam, Domo Anne Frank (25-31a de julio). Temo : « Komunikado ». Aĝlimoj : 18-30 jaroj. Anne-Frank-Domo, Prinengracht 263, Amsterdam C. Nederlando.

— Montara Esperanto-Somerumejo, en Bela Palanka, turisma loko apud Niš, en Serbio. Informoj ĉe : Rakic Najdan, Lj. Randjeloviĉa 21, Bela Palanka, Jugoslavio.

— Italaj katolikoj organizas pilgrimon al Jerusalemo, tra multaj landoj (26a de aŭgusto-19a de septembro). Skribu al Pr-ino R. Maudente, Via Belmerolo, Bologna, Italujo.

EL LA MONDO ESPERANTISTA

— **La Peticio** : Jam dekoj da miloj da personoj en 36 landoj kaj pli ol 200 organizaĵoj de 19 landoj subskribis la peticion al Unuigitaj Nacioj.

Ĉu via loka klubo kaj vi mem ekzamenis kion vi povas kaj devas fari ?

— **Armenio** : En la kadro de la Jaro por internacia kunlaboro, starigis en Armenio, Esperanto-Komisiono por eksterlandaj kontaktoj. A O R S, Esperanto-Komisiono, Str. Abovjan 3 ; Erevan, Armenio, Soviet-Unio.

— **Kongo** : Konga Esperanto-Instituto petas vin kunlabori por propaganda ekspozicio de infandeseĝnaĵoj (de infanoj 6 ĝis 15 jaroj). Sendu lin antaŭ la 1-a de septembro. Adreso : Konga Esperanto-Instituto, B.P. 7579, Leopoldville I, Kongo.

— **Aŭstrio** : Inaŭguro de esperanto-monumento en Linz, okaze de internacia renkonto, tuj antaŭ la Esperanto-Konferenco de Vieno : 9-11a de julio. Informas Sro J. Geroldinger, Marcusgang 7, Linz.

— **Ĉinio** : Depost la 10a de decembro, Radio Pekin dissendas en esperanto, vendrede kaj sabate, la 20a ĝis 20.30 (G.M.T.) per ondoj 51 m. 40, 40 m, kaj 30,10 m.

— **Nordvietnama** : Okaze de la « Vietnamia Tago », organizita en Hanojo de Vietnamia Pacdefenda Esperantista Asocio, estis malfermita granda Esperanto-Ekspozicio.

LIBROJ KAJ REVUOJ

— Pr. Bokarev laboras pri kompilado kaj revizio de granda rusa-esperanta vortaro kiu devas aperi fine de la jaro. La esperanta-rusa verŝajne aperos proksiman jaron.

— Urugvaja Esperanto-Societo decidis eldoni presitan natursciencan revuon : « Kemio Internacia » pri kemio kaj rilataj fakoj. Ĉiuj interesatoj estas petataj rilati je la adreso : Casilla de Correo 1040, Montevideo, Urugvajo.

— Certa nombro da presprovaĵoj de la « Esperanta Bilvortaro » jam eldonita. Limigita kvanto da ili ankoraŭ aboneblaj (50 stel.) kio rajtigas ricevi definitivan verkon kun 50 % da rabato.

Unuaranga konsulta verko. Jam kunlaboris 170 gesamideanoj. Aliaj kunlaborantoj serĉataj por specialaj fakoj. Adreso : Esperanto Press, Cardiff, Ontario, Kanado.

OMAĜE AL ZAMENHOF

— Laŭ lasttempa statistiko, ekzistas almenaŭ 238 stratoj aŭ placoj kun la nomo de Zamenhof aŭ de la lingvo mem en 21 landoj. Ĉu via loka klubo provis fari ion tiusence en via urbo ? Ne forgesu ke multaj novaj kvartaloj konstruiĝas !

EL IE EN LA MONDO

LA VIVO EN LAPONIO

DE FINNLANDO

(FINO)

Kiel jam menciite, en la finfazo de lasta mondmilito detruigis la plej granda parto el la loĝdensejoj en Laponio. Sed vigle rekonstruis la loĝantoj siajn detruitajn urbojn, vilaĝojn kaj hejmojn.

Ce tiu rekonstruado ili vekigis je vigla agado en ĉiuj fakoj. Oni konstruis novajn, pli grandajn kaj pli modernajn lernejojn por anstataŭgi la detruitajn. Aldone oni fondis novajn. En plej grandaj loĝdensejoj troviĝas

La pasintaj jaroj konfuzigis la kapojn de nordfinno; la milito detruis preskaŭ tuton; oni evakuis la loĝantaron; reveninte ili estis devigataj vivi en tute nova epoko; la spiritaĵoj kaj la moralaj konceptoj estis ŝanĝigitaj; kaj al ĉi ĉio oni devis kutimiĝi. Tamen en sia profundo la nordfinnoj ne ŝanĝiĝis. Je sia animo ili estas samkarakteraj kiel antaŭe kaj kaŭze de tio tiel amataj de sudlandanoj.

Por la junularo kreskado en la nova epoko estis pli facila. La intertempa transloĝigo estis kiel studvojaĝo en la nunan malpacan, senrotektan epokon. Longa studperiodo de kutimigas la infanojn for de boacbredado. Inflacio kun sia facile akirita mono kaŭzas, ke nuntempe la laponiaj knabinoj preferinde surmetas nilonajn vestojn anstataŭ belajn popolkostumojn. Eĉ en preĝejan vilaĝon laponia knabino ne volonte venas survestita per popolkostumo, ĉar ŝi timas iĝi ridinda.

Ankaŭ tranoktado en dezerto ne plu apartenas al ĉiutaga vivo. Kaj grimpado sur montojn okazas nuntempe nur kiel ekskurso.

Loĝanto de la Nordo ne plu estas tiel sola dezertulo kiel antaŭe. Li havas radion por ricevo de novaĵoj. Ĉe mizerego helpas la ŝtato. La aeroplanoj trafikadas de la sudo al la nordo rapidigante la interrilatojn inter riuj du ekstremitoj.

Oni konjektas, ke kaŭze de la nova epoko kaj la novaj trafikiloj la soleco el Laponio estus malaperinta... Nu jes... somere abundas turistoj, sed la vintroj estas longaj kaj ŝajnas esti pli solecaj. Se de vilaĝoj ne estas aranĝita ir-kaj revenvojaĝoj en sama tago, oni eĉ ne plu iras preĝejon ĉe Kristnaska-festo. Kiu nun plu vojaĝus per boaco, ĉar la nuntempo kunportis la « Urgon » ankaŭ en Nordo? Boaco kun kapo jungita per ornamita jungilaro, estas malofertaĵo en preĝeja vilaĝoj de Laponio.



duagradaj lernejoj, enkondukantaj en Universitatojn. Pojare oni aranĝas en Kemi kaj Rovaniemi kultursemajnojn, kies programo enhavas ekspozicion de pentrartaĵoj, kunvenon por verkistoj, teatraĵojn kaj koncertojn.

Ankaŭ la iama paco kaj edukanta influo de naturo malfortigas. El la suda parto transloĝinto rilatas al naturo alimaniere ol per propra edukado de dezerto. Ŝajnas, ke la Tundro-Laponio iom post iom mortas en la animoj de la lokaj loĝantoj. Ĝi restos nur en la fantazio de turistoj. Jam silentigis tintado de la unua sonorilo de Rovaniemi en la sonorilejo de Ounasvaara. Silentigis ankaŭ ĉiuj aliaj, misteraj sonoj de la superstiĉa epoko. Sed kiam oni haltas antaŭ iu malnova memorsigno, de malproksime malantaŭ la pratempoj aŭdiĝas iamaj legendoj. Tiamamente la pasejo, nuno, kaj estonto salutas unu la alian.

Ĉe la plej hela sezono konstatas vizitanto de Laponio, ke tie ĉi ĉio estas miksitaj. — Li rigardas sian horloĝon kaj konstatas, ke ankoraŭ je 2 - 3 a post noktomezo la lo-

vojaĝas tien nur je finsomero inter la mezo de Aŭgusto — kaj la komenciĝo de Septembro. Tiam la moskitoj estas malaperintaj kaj la vetero estas ne plu tiel varma kaj nebuleta kiel mezsomere. Vespere kaj matennokte varias la mirindaj krepuskoj kaj la trembriladoj, kiujn oni renkontas nenie aliloke en la mondo. Kiam ja post du noktaj frostoj la tuta pejzaĝo ŝanĝas siajn kolorojn, tiel, ke ŝajnas, kvazaŭ ĉie furiozus arbara brulo, fremdulo ne kredas siajn okulojn. Ni nomas tiun sezono : « Ruska sezono ». La multaj artistoj konstatis, ke ne utilas fari pentraĵojn de la norda kolorbrilo por vendi ilin en sudo, ĉar neniu tie kredas la kolorojn naturaj. Aĉetanto devus mem vidi tiun kolorriĉaĵon por konstati, ke artisto eĉ per sia tuta arto ne sukcesis pripentri tion, kion kapablas la naturo en nordo.



ĝantoj faras siajn hejmtaskojn kaj la infanoj ludas ekstere. Oni promenas en kortoj kaj oni mansignas al preterpasantoj. La suno fakte ja ne subiras, sed nur momente malkaŝiĝas malantaŭ altmonto. Tage povas esti tiel varme, ke jako estas demetenda. Sed la moskitoj... tiuj teruraj turmentuloj en la ĉarma somero de Laponio ! Feliĉe oni povas forpeli ilin per moskitoleo. Se ne ekzistus moskitoj, kia ferio-paradizo estus la nordo... La sunkultantoj povus sunbani sin tie ĉirkaŭ unu monaton tage kaj nokte.

Por sudlandano valoras la vojaĝo nor- den por vidi la mirigan meznoktan sunon. Sed tiu, kiu konas la jarsezonojn de Laponio,

Plej fortajn spertojn, apar- tenajn al Arbar-Laponio travi- vas vaganto, kiu lasas aŭton kaj ŝoseon ; kiam post « sen- nokto » en dezerto, laciĝinta, li ekdormis dum la moskitoj svarmas ĉirkaŭ la dormujo, kaj, vekiginte li vadas en marĉoj batalante kontraŭ la tabanoj ! Kiam oni vidas bo- acojn kuri persekutatajn de moskitoj, skuante siajn ka- pojn, kun angora brilo en siaj okuloj. Nur vidinte ĉi ĉion oni kontaktiĝas kun la ĝusta, mal- falsa Laponio.

Kiu sentopleniĝis pri la dezerto, tiu rigardas volonte ankaŭ ĝiajn vintrajn vidaĵojn.

La kontakton al ĝia vintra be- leco trovas tiu, kiu ĝis laciĝo vadas sur ne- ĝaj deklivoj tirante glitveturilon post si, sur neĝokrusto ekbruligas fendet-fajron, kaj si- dante apud sia fajrejo admiras la nordlumon dum frostego klakas ĉirkaŭ li.

La rezinaj ligneroj kaj la branĉetoj bo- nodoras : la fajro varmigas. Ĉe la nokta ĉielo ekbrulas la verdaj, fantomaj fajroj : la nord- lumo. De malproksime aŭdiĝas iu mistera sono. La dezerto estas plena je granda sin- dono.

Kiu enamikiĝas kun Laponio, tiu trovas en ĝiaj kaŝejoj ĉiam ion tian, kia instruas humiliĝon antaŭ la grandeco de la naturo kaj la arton ĝui la parolojn de la silento.

Kerttu Väättänen.

Finlando.

De preleginto en Grésillon

PRI ARTO (¹)

Enkonduko :

Oni povas pritrakti la temon dogme kaj oni povas pritrakti ĝin historie. Dogme, kiam oni klopodas trovi respondon al la demando : « kio estas arto ? » Historie, kiam oni studas la diversajn manifestaciojn, la evoluon de la arto en la daŭro de la jarcentoj.

Ofte okazas ke personoj kiuj ekz. iras al ekspozicio de pentraĵoj humile konfesas, ke ili ne scias ĉu la montritaj verkoj estas vere belaj, ke ili ne komprenas la arton. Okazas ankoraŭ pli ke ili ne konfesas tion ! Ankaŭ la fakto, ke iuj personoj kondamnas senkondiĉe difinitajn specojn de arto montras same, ke ili ne havas bonan komprenon pri la esenco de la arto. Cetero, faru, ankaŭ al kleruloj, la demandon : « kio estas arto ? » kaj tuj vi aŭdos la plej konfuzan interparoladon, en kiu estas nek ordo nek klareco.

Ĝenerale, la juĝo de la personoj estas laŭ la famo kaj la juĝo de « kompetentuloj ».

Ilia juĝo dependas de aliaj, sen ke ili mem scias kial la artaĵoj estas jes aŭ ne belaj. Tia situacio estas ankoraŭ pli malfaciligita pro la fakto, ke, ĝenerale, artistoj aŭ art-specialistoj ne inter si akordiĝas pri tio kio estas arto. Tial la ĉi-sekvanthaj kelkaj ideoj eble povos iom klarige prilumi la problemon de la arto.

La Subjekto :

Mi unue skribas kelkajn pensojn pri la persono, kiu staras antaŭ artaĵo. En lia sinteno je la artaĵo ni distingas la komprenon de la artaĵo kaj la ĝuon pri la artaĵo.

A) Kompreni. Por kompreni ni devas koni la signifon de la artaĵo. Tiu ekkono fariĝas laŭ

du manieroj. Aŭ oni sentas ĝin spontane, per la intuicio. Se tiu psikologia proceso ne okazas, oni devas ekkoni la signifon de la artaĵo per la esplorado kaj lernado de la diversaj cirkonstancoj en kiuj la artaĵo ekestis : la historiaj aŭ geografiaj, filozofiaj, psikologiaj, personaj kaj eble ankoraŭ aliaj cirkonstancoj. Kutime ambaŭ manieroj influas la homon. Preskaŭ ĉiam la ekkono de la cirkonstancoj, la ekkono de la historiko (= la historia evoluo kiu kondukas al la kreado de tiu artaĵo) pligrandigas la intuician komprenon de la



artaĵo. Ofte okazas ankaŭ, ke oni tute ne intuecie komprenas. Sed kiam oni lernas la historikon, oni sentas subite ke la lumo venas en la intuicio, kaj oni ankaŭ intuecie komprenas.

Ekzemploj. Oni povas intuecie kompreni la arton de Greka-Dorika templo kiam oni estas sub la impreso de la peza seriozezo, graveco, preskaŭ pesimismo, kiu elradias, kiu kovras tiun sobran, multpezan stilon. Tamen ni pli bone komprenas ĝin, kiam ni konas la cirkonstancojn, ekz. kiam ni konas la filozofion de la antikvaj Grekoj.

Ĝenerale oni juĝas la « Militista Marŝo »

de Schubert tre bela. Sed kiam oni konas la historion de tiu epoko, precipe la morojn, oni tuj vidas ke vere tuta epoko estas montrita per tiu muziko. Kaj tial oni opinios ĝin despli bela.

Nun sekvas la poemo « Noktaj pensoj » de W. Auld.

Se l'korvo de la grako noktas
Kaj vojas melko de la lakta lago,
Sub staroj de l'ciela ŝakto
Mi ŝtonas pro torporas ŝlim
Kaj tim kaj tim
Kaj tikas tako : via brako
Mara tempesta blankis dum alturri'
Por nest por krure

ŝnure

Ŝtonas koro estas rok inverde
Eĉ merdas krie senutile.
Aj, o kapricoj de l'pajacas grundas
Kaj inter ŝtormoj nudis ŝirmo sirmon
Kaj jes, kaj eĉ hodiaŭ samo
Ne pluvo pluro pli la plumis pento
Kaj jen jam sento ub racie pensi
O zum o zum o puls as is as os
kaj spros'
matur'

Jen timotemtamtamas lamas
Flugilan jes kun plumas tuŝas
nokt'

Ĉar Diro duras ĉar racie penso
Alarmas ke alarmu larmojn zum

zum
kriĉ

infanoj pepo birdoĝoj' ekvakas
Lako lakto de la grakas korvas
tuŝo zume en podagro bara
oj kara kara senuteras plend'
anstataŭ tio :

Ĉu vi frotas viajn okulojn, leganto ? Ĉu vi diras : kia sensencaĵo ? Je mi faris la efikon, kiun faras surrealistaj pentraĵoj. Ĉu ĝi ne estas surrealistaj poemoj ? Kaj kiam vi pripensas, ke la surrealismo montras la mondo de la sonĝo, kaj de la profundaj strebadoj kaj deziroj de la homa animo, ĉu tiam vi ne povas konkludi ke jes « estas io » en tiu-ĉi poemo ? Ne kredu ke mi pravigas ĉion kio aperas en tiu ultra-moderna arto.


Tute ne. Mi kredas ke multego estas nur provo kaj ne malmulto nur ĉarlatanaĵo. Sed mi kredas, ke estas ankaŭ belaj poemoj en ĝi. Do, post tiu mallonga kaj nesufiĉa klarigo ĉu vi ne intuecie komencas kompreni ĝin ? La klarigo malfermas la intuician komprenon. La intuicia kompreno fariĝas kiam la intelekta klareco estas iugrade sur la nivelo de la ecoj kiuj estas en — kaj radias el la artaĵo.

B) Ĝui. Por ĝui artaĵon, ne nur la intelekta klareco devas esti sur la nivelo de la ecoj kiuj estas en — kaj radias el la artaĵo, sed ankaŭ la anima stato devas esti sur tiu nivelo. Oni devas plej profunde « en la koro de la koro » emi al tio, kion la artaĵo signifas. Oni devas ami, karesi la idealojn, kiuj speguliĝas en la artaĵo. Ekzemple, multaj povas ĝui la arton de gotika katedralo kiu altentiras, ĉielentiras la homan rigardon kaj la homan personon per ĝiaj pintarkaĵoj kiuj similas al en preĝo kunplektitaj brakoj, levitaj al la ĉielo. Tie-ĉi montriĝas la dualismo inter kompreni kaj ĝui. Ekzemple, multaj komprenas la stilon Ludoviko XIVa aŭ XVa, sed tute ne ĝuas ĝin. Ili vidas la kristaliĝon, la speguliĝon de la spirito de tiu epoko sur tiu stilo, kaj en tiu senco ili komprenas tiun stilon. Sed ili eble tre malŝatas tiun spiriton kaj do ne ĝuas tiun arton, kiu estas la bildo de tiu spirito. Tamen, oni devas fari ankoraŭ distingon. Se iu diras ke li opinias tiun stilon belega, kion li fakte volas diri ? Eble nur tio, ke tiu meblo, aŭ io alia, estas tre bone sukcesinta enkorpiĝo de tiu spirito kaj ke ĝi bone karaktermontras la epokon. Kaj la scio de tio, la vido en unu konkreta bildo de la animo de tuta epoko, donas ian ĝojon. Rimarku bone : ĝojo, kaj ne ĝuo. Ni estas nun plene sur la tereno de la psikologio. Mi do diras, ke en la ĝojo estas ĉiam ankaŭ kelkaj eroj da ĝuo. Tamen restas tie-ĉi la tre granda diferenco inter ĝojo kaj ĝuo. Ĝojo : sekvo de kompreno ; ĝuo : ĉar oni tre interne, intime ŝategas, amas. Almenaŭ tio estas aplikebla sur la tereno de la arto. Tiel ni povas konkludi ke la ĝojo pri artaĵo estas precipe sekvo de la kompreno de la artaĵo ; kaj tiu kompreno mem estas la sekvo de la intelekta nivelo de la homo rilate al la artaĵo. Kontraŭe, la ĝuo estas precipe de la animstato de la homo kiu vidas speguliĝon en la artaĵo.

(daŭrigota).
Drs F. ROOSE.

LA TOURS-LANDO KAJ ĜIAJ MEDICINISTOJ

La norda pordo de nia urbo esas gardata per la statuoj de Rabelais kaj Descartes. Tiu kunigo estas, almenaŭ vi konsentu, sufiĉe ekster-ordinara, ĉar de post miloj da jaroj, dum kiuj, tiom multe da homoj ekzistis sur la tero, la denseco de la ĉefaj mensoj, mortintaj aŭ vivantaj, po kvadrata kilome-



tro, estas sufiĉe malpeza. Sirmata sub protekto de tiuj du famaj infanoj de nia provinco, via kongreso estas destinita je plej brila brilo.

Ke la Muzoj estu al mi favoraj, speciale Klia, tiel ke, je la komenco, tiu parolado ne ĝin ekfuŝu. Peguy tranviligas min iomete : « La 40-jara homo, li diras, eksentas la forkuron de sia juneco... Profunde en lia melankolio, li rigardas malantaŭen, li fariĝas kronikisto kaj memoraĵisto... La 40-jarulo ne fariĝas 50-a. Li fariĝas historiisto. Kaj nenio estas tiom gaja, kiom historiisto, ĉar estas konstante ke nenio estas tiom gaja, kiom enterigisto, kaj temas pri sama metio... Tial, al la 50-juralo, Dio kompletas la transformon al historiisto... »

Ni ŝuldas, tie-ĉi, al nia kolego Rabelais « eterna honoro de la Tours-lando », tiun malnovan parolmanieron, puran kaj koloran kiu estas kvazaŭ « kremo de la franca lingvo », kaj kiu, naskita dum la Renesenco, tiom rolis favore al la ekfloriĝo kaj la unuiĝo de nia nacia literaturo. Sed tiu miriga humanisto, kiu majstras pliparton el la homaj konoj, akcesore monaĥo, estis erudita kaj sagaca medicinisto, scioplena anatomiisto kaj avangarda fiziologisto, kies plej kerna medolo ekaperas spite al la superriĉeco de la stilo kaj krudeco de la vortoj.

Rabelais kvalifikis sian gepatran regionon jene : « paradizo pro salubreco, mildeco, sereneco, oportuneco, ravoj kaj ĉiuj honestaj plezuroj en agrikulturo kaj kampara vivo ». Mi esperas, Sroj Kongresistoj ke je la fino de via restado, vi opinios same pri tia juĝo, kiu similas tiun de unu el la plej mirigitaj vizitantoj de la Tours-regiono, Anatole France, kiu deziris trapasi siajn lastajn tagojn en la Bechellerie sur tiu privilegia monteto de St-Cyr, ĉar « li ne trovis lokon, kiu estis pli taŭga al la klimato de sia koro ».

Ce ni, ankaŭ, en la Haye, naskiĝis la aŭtoro de la « Parolado pri la Metodo », kiu estis ne nur la filozofo kiu meditis pri la vojoj, laŭ kiuj, paŝo post paŝo, la racio serĉas pri la vero, sed ankaŭ estis scienculo absorbe okupata pri anatomio, fiziologio kaj medicino. « La konservado de la sano, li skribis en 1645 al la Markizo de Newcastle, estis, ĉiam, la ĉefa celo de miaj studoj ». Tiu « Reĝo de la Menso » kiel Alain nomis lin, proponis al la Medicino, tiam haltigita de la statika aŭtoritateco de la antikvaj doktrinoj, ke ĝi helpu sin per metodo kaj eksperimentado. Se lia klariga verkaro ne kontraŭstaris la maljuniĝon — la ĉefaj teorioj ne estas senmortaj — almenaŭ la malkovro de la refleksivaj efikoj sufiĉas al lia glorigo.

Dum via mallonga restado ĉe ni, vi ricevos multajn okazojn por renkonti la literaturajn glorojn, kiuj travojaĝis tiun landon de takto kaj ekrido. Ĉe la Abatejo St-Côme, dediĉita al la du medicinistoj St Côme kaj St Damien, vi renkontos Ronsard, reŭmatula prioro, sed poeto de la Amoj, kiu, eble, bedaŭras la nerealigo de sia junuleca revo pri studo de medicino :

« Ha ! Kian malamon kaj envion mi sentas
Kontraŭ kuracisto, kiu matene venas
kaj vespere, sen rajtigo, palpi la mamon
al mi' amatino, kaj gorĝon, ventron,
[bruston. »

Al plej kompleta eldiro de la Renesanca genio, en Chenonceaux, vi elvokos J.J. Rousseau, en intimo kun la ĉarma mastrino, Sino Dupin, verkante tie, en 1747, « la aleo de Sylvie », kaj zorgante pri la unua prezento de la « Vilaĝa divenisto ». Ankaŭ en Chenonceaux, Bretonneau, porsaniga oficiro, pensadis, observadis, kaj disvolvis la revoluciajn konceptadojn, kiuj ekhavigos al ni modernan medicinon. En Amboise, en plej majesta dekor, vi ekvidos Chanteloup, kie Choiseul restadis por ŝirmi sian malfavoron, kaj ricevis ventrodikecon tian, ke ĝi provokis de Louis XVI-a, la rimarkon : « Sro de Choiseul, vi multe grasiĝis en Chanteloup ». Tiu malgranda historia memorigo estas omaĝo al la riĉaj mangaaĵoj de la Tours-lando, kiujn, mi esperas, vi povos gustumi tempo-sufiĉe.

Kelkajn paŝojn poste, en lia kastelo de Cloux, la plej miriga enkorpiĝo de la homo pensanta, Leonard de Vinci, suferanta artériosklerozo kaj hemiplegio, strekis, maldekstramane, la lastajn desegnaĵojn de sia « Pri Anatomia Traktato », kaj verkis la mirindan manuskripton, kiu temas pri « okulo kaj vido », kie, unuafoje estas formulata la teorio pri la malluma ĉambro.

La portreton de Mona Lisa, oni portis eksteren de la ĉambro, nur post la morto de Leonard, en 1519. Al tiu anĝela kaj mokema ekrido de la « Joconde », similas la ĉielo de la Tours-lando. De tiu sama ekrido inspiriĝis Rabelais, por sia Pantagruel, kaj Courteline, filo de Jules Moineaux, kaj patro de Bou-bouroche : « Pli bone estas pri ridoj ol pri larmoj verki ».

Tia estas la menso de nia provinco, kiun Balzac, tiom profunde enpenetrata de Rabelais, tiom bone difinis : « la ulo de la Tours-lando uzadas sian menson por moki la najbaron, por amuziĝi, kaj alvenas je la fino de la vivo, feliĉa ».

...Ni rediru tie, ke estas dank'al la Tours-a kuracarto, ke A. de Tocqueville estis kapabla verki tiun ĉefverkon de la historia literaturo, la libron pri « la malnova reĝimo kaj la Revolucio ». En 1853, malsana, li ekloĝis en St-Cyr-sur-Loire, kie Bretonneau provis kuraci lin. Ch. de Grandmaison, la arĥivisto de Tours, estis tiu, kiu instigis lin al uzado de la riĉaj lokaj arĥivoj, kaj ekspluato de tiuj historiaj funtoj pli precizaj ol la rakontoj, kaj ĝis tiam ne uzitaj de la historiistoj.

...Malmulte da urboj, kiel Tours, entenas imponan kvanton de bulvaroj kaj stratoj, kies nomo estas tiu de fama medicinisto el ĝia hejmgrundo. Permesu al mi, trapasante rapide la jarcentoj, elvoki la plej karakterizajn etapojn de tiu riĉa primedicina historio de la Tours-lando.

(Daŭrigota).

*El prelego de Pro ARON,
Dojeno de la Medicina Fakultato en Tours.*

Esperangita de Dro J. Dumas.

AKTUALAĴO { Ku Klux Klan }

La gazetoj denove parolas pri la Ku Klux Klan, kiu per teroro kontraŭstaras la usonajn leĝojn kontraŭ la ras-apartigo. Oni akuzas tiun sekretan organizon pri murdoj de nigruloj kaj ankaŭ de blankuloj favoraj je la ras-integrado. La tri vortoj Ku Klux Klan ŝajnas al ĉiuj strangaj. Nemultaj estas la homoj kiuj ne konas tiun nomon, sed ankaŭ nemultaj estas tiuj, kiu konas ĝian devenon.

Ĝi estis fondita en decembro 1865 de kelkaj Sudistoj en la ŝtato Tennessee apud la limo de Alabama. La junuloj kiuj ĝin kreis intencis nur amuziĝi. Post kvinjara militado ili deziris trovi la soldat-fratecon. Pro romantikemo ili decidis fari la organizon sekreta. Ili serĉis nomon kaj elektis la grekan « Kuklos » kiu signifas cirklo. Poste « Kuklos » fariĝis Ku Klux pro analogio kun nomo de indiana grupo Kokletz. La vorto Klan devenas de la skota. Alia prunto al la Skotoj estas la kutimo bruligi krucon por anonci sian alvenon.


La junaj Ku Klux-anoj sin ornamis per strangaj titoloj. La estro de la tuta « Nevidebla Imperio » nomiĝis la « Granda Sorĉisto ». Li estis helpata de dek « Genioj ». En ĉiu el la ŝtatoj, kie influas la K.K.K. regas ĉefo nomita « Granda Drako » helpata de ok Hidroj. Ekzistas ankaŭ aliaj fakoj korespondaj al pli malgrandaj grupoj. La baza ĉelo estas la « Den » aŭ « kaverno » estrata de la « Granda Ciklopo » kaj du « Otusoj ». La simplaj membroj estas la Ghoul-oj. Por fariĝi Ghoul iu viro devis esti almenaŭ dek-ok jara kaj esti prezentita de du membroj. Poste la kandidato trapasis ekzamenon. Fine la iniciato estis dumnokte establita ; ero de tiu ceremonio estis la subskribado per propra sango sur papero poste bruligita.

La cirkonstancoj diktis la doktrinion de tiu asocio. La nepreparita emancipado de la sklavoj naskis ekonomiajn malfacilaĵojn en tiu lando ruinigita de kvinjara milito. Tiam la Ku Klux-anoj decidis defendi la « rajtojn » de la blankuloj. De tiu tempo la membro-kandidato devis respondi la jenajn demandojn : « Ĉu vi kontraŭstaras la egalrajtojn de la nigruloj ? Ĉu vi deziras la regadon de la blankuloj ? » Ĉe la komenco tiu movado ne estis perforta. Ĝi submetis la nigrulojn per la mistero. Nokte, membroj de la Ku Klux Klan fariĝis strangaj fantomoj. Senbrue ili alvenis en vilaĝo rajdante ĉevalojn drapiritajn per steloj aŭ bildoj de bestoj. Blankaj maskoj kaŝis la vizaĝojn kun nur du truoj por la okuloj kaj, kelkafoje, pendantaj ruĝaj langoj el felto. Ili diris al la nigruloj, ke ili estas la fantomoj de la Sudistoj mortigitaj dum la milito. Sed iom post


iom la neperforta asocio fariĝis terorista. La fantomoj « punis » la « kulpajn » nigrulojn kaj poste eĉ la nekulpajn. Tiam la « Granda Sorĉisto » ekŝiĝis kaj multaj membroj kun li. Tamen la Ku Klux Klan perdis sian viglecon nur en 1872, kiam estis restarigita la superregadon de la blankuloj en la Sudaj Ŝtatoj.

Sed la Ku Klux Klan dufoje renaskiĝis. Unuafoje en 1920, kiam ĝi provis fariĝi la « nacia konscio ». Kaj nun denove ĝi estas aktiva. Sed ŝajnas, ke la nombro de la membroj estas multe pli malgranda ol antaŭ kvindek jaroj. Plie, la movado ne estas unueca. Ekzistas du « Grandaj Sorĉistoj » : Bill Davidson, en Georgio, pli idealista, kaj Robert Shelton en Alabama, pli realista. Sed la ordonvortoj estas nun : naciismo, rasismo, antisemitismo, antikatolikismo, fremdfobio.

La Ku Klux Klan nun varbas siajn membrojn el la « malgrandaj blankuloj », kiuj ofte « superas » la nigrulojn nur per la koloro de sia haŭto. Se la haŭtokoloro ne plu estos la distingiga signo de supereco, multaj el ili staros sur la sama ŝtupo, kiel la nigruloj kaj oni eĉ kredigas al ili staros sur pli malalta ŝtupo. Por tio, ĉar ili estas malfortaj ili aprobas perforton.



Kelkaj francaj realigaĵoj




La nukleaj centraloj en Chinon :

Ili estas tri kaj celas al la produktado de 850.000 kiloŭatoj en 1965. La franca metodo permesas, kun la tria centralo (EDF III) akiri elektrokurenton, kies prezo certe estos ne multe pli alta ol tiu de la kiloŭatoj produktitaj de la klasikaj centraloj. EDF III estas la unua centralo en la mondo kapabla liveri potencon de preskaŭ 500.000 kiloŭatoj.

La Rance uzino :

Ĉi estos la unua uzino en la mondo utiliganta la tajdo-energiecon. Jam de tre longe la loĝantoj de la marbordo provis submeti la sovaĝan energion eligatan de la fluso kaj retrofluso. Ili konstruis muelilojn funkciigatajn de la mar-akvo puŝanta padelradojn. Tajdo-mueliloj aperis en Francio sur la Bretonia marbordo jam en la 12-a jarcento.



FANTAZIAJÒ DE HÉLÈNE CHAVAN

MEMORAJO



(2-a PARTO)

Lia vizaĝo eklumis, radiis pro kontento, malfrue mi komprenis, ke Line donis al li la deziratan ŝanĝemon.

— Jes, kun plezuro. La dua posedanto havis nur unu nepon, kiu trinkante, ludante, amuzante, nedecce malŝparis lian havaĵon. Do, la avo prudente kaŝis sian trezoron, sed li mortis akcidente, ne rivelinte la kaŝlokon.

— Ha ! Ha ! Hieraŭ vi ne ĉeestis la kurson, eble vi serĉis la trezoron en la tegmenta ĉambro !

— Ne, sencerba junulino, oni riparis la tutan tegmenton kaj trovis nenion, do ĝi devas esti aliloke, eble subtere.

— Ho ! ĉu vi proponas al ni fosadi Grezijonan kamparon por trovi ĝin, kiel la plugistidoj de fama fablo ?

— Lasu tion ; ĉu vi permesas al mi pantomimi malgrandan tekston de Don Kihoto ?

Ni kapjesis, feliĉaj ĉar li ankaŭ mirinde mimikis.

Li levprenis longan, pintan brakdiklan foston, kaj paŝis, singarde antaŭenŝoviĝis ; flamis liaj okuloj, kruela rideto signis lian baldaŭnan venkon sur ni mem, sidantoj sur disfalema muro ; jes, li alproksimiĝis, minacis nin per sia terura ponardo. Mi, kapemane ĝojis pri tiu mimajo. Etienne starante sur la muro, lin ekcitis. Jocelyne pretis fuĝi antaŭ la venkonto. Johano silentis, li eble ne ŝatis tian komedion. Kiam, subite, José ĵetiĝis antaŭen, la pinta fosto facile trafenetris la muron kun tremo kaj frakaso ; krioj, vėjoj, korvoblekaj kaj nenio plu. Silento.

Ventre sternita antaŭ tremantaj lekantoj, mi, unue ekvidis blankan postaĵon de leporo malaperi en fora fono de la arbareto. Doloroj en la mano revenigis min al realaĵo, mi stulte, spasmis premis rampantan rubusujon. Tuj mi leviĝis, fortiris la dornojn, viŝis sango.

La aliaj ?

La muro ne plus staris ; tie ĉi kaj tie forruliĝis ties ŝtonoj. Etienne veadis, komike saltis, tenante ambaŭmane sian dekstran genuon. Kaŭranta Johano ŝajnis esti la vera idioto de la vilaĝo, li senĉese frotis sian verton por eble malpli forte senti la doloron, kaj Jocelyne ?

Ventre kaj senmove ŝi kuŝis malantaŭ stonego.

— Jocelyne ! Line !

Mia raŭka alvoko surprizis niajn du suferantojn ; tuj ili proksimiĝis al ŝi, forgesante siajn dolorojn. Tiam esplodis laŭta ridego.

— Ha ! vi ambaŭ, kiel vi estis komikaj, mi tiel deziris foti vin en tia inteligenta sentenado.

Profunde ŝi spintacitis ilin. Sed rapidpense demandis Etienne :

— Kie estas la alia... stultulo ?

— Jes, aprobis Johano, kio pri li, respondulo de tiu frakaso ? Li trankvile genuis kun manoj kunigitaj, ekstaze rigardante ion, murmurante malrapide, senĉese benojn, dankojn esperantlingve.

— Alproksimiĝu, karaj samideanoj, vidu fine mi trovis la trezoron ; prenu tiujn orajn monerojn, kaŝitajn en la muraĉo.

Ni, avide, sciolve alproksimiĝis, ne kredante lin. Sed, vere inter kelkaj ŝtonetoj, brilis, eĉ tro flamis ormono. Li daŭrigis :

— Vi bone min aŭskultis, eĉ ludis kun mi, do vi ja meritis tiun... ĉokoladan monon. Mi tutkore regalas vin : Helena, elektu la unua.

— Pro mia malsaĝa hepato, mi devas rifuzi, mi respondis iom sektene.

— Kaj vi, rava Jocelyne ?

— Dankon ; ĉokolado malbele ornamas mian vivzaĝon je ruĝaj butonoj !

— Vi, Johano, ne rifuzos tiun mangaĵon ?

— Dankon, mi frandas nur vŝian ĉokoladon.

— Tion mi komprenas, rimarkis Etienne.

Al li José ne proponis sian ĉokoladon, certe li timis tro tiklan eĉ krudan respondon.

— Do, mi mem ĝin mangos. Dirante tion, li majeste leviĝis ; tiam kvar laŭtaj ridegoj eksplodis : liaj blankaj, ostecaj genuoj strange ekpintis ! lia disŝirita pantalono. Li ne ofendiĝis, male ridis kun ni, ame tikleante siajn nudajn genuojn, kaj denove seriozmiene :

— Kiom diros mia kara edzino, mia multparoléma Maria Pia Dolores ? Mi tuj hejmeniros trans la fervojon.

— Sed estas severege malpermesita !

— Ne por Ni Hispanoj ! !

Gaje fajfante li malaperis en la arbareto, certe feliĉega havi la klantan vorton.

Hélène CHAVAN, Lausanne.

POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO

La solvoj de la du subaj problemoj estu senditaj al

Sro CHEVALIER, 19, boulevard G.-Lauriol

NANTES 44 (Francujo)

antaŭ la fino de Majo 1965.

UNUA PROBLEMO (20 poentoj)

El la jenaj prepozicioj, bonvolu elekti tiun taŭgan por ĉiu suba frazo.

Per, kun, por, jen, preter, ĉirkaŭ, ĵe, sen, pro, krom.

1) La oficiro alvenis en la urbon sieĝitan irinte la malamikan tendaron.

2) Pensoj iras limo sen pago kaj timo.

3) tiel oni devas agi se oni ne volas esti trompata.

4) la mateno la vento finiĝis.

5) Ĉu ili faris tion ĉi ia praktika utileco?

6) Ĉu vi opinias min kapabla tia malnobla agado?

7) la tempo povas veni io bona.

8) Tiu libro, ... malsaĝaĵoj, enhavas ja nenion.

9) Ni tiam penos venĝo trankviligi nian koron.

10) Ni ne kalkulis tiu malhelpo.

Estos kalkulitaj po 2 poentoj por ĉiu prepozicio ĝuste enlokita, sed estos forprenita po 1 poento por ĉiu eraro.

DUA PROBLEMO (10 poentoj)

Silab-enigmo

AG AL BO DO DO EL ER FE FO FO FO GO
GI GO HA IN KO LA LI LO LO MO NA NE
NO NO OR OS OS PI PO RI RI RO RO SE
SO TO TO UR VI ZO

El la supraj 42 silaboj formu disilabajn vortojn kun la sekvantaj signifoj :

1) Skrapi kampon. — 2) Itala monero. — 3) Nederlanda urbego. — 4) Arbara bestego. — 5) Flaror-

gano. — 6) Fianĉina allogaĵo. — 7) Malmola parto en la korpo. — 8) Vintra blankaĵo. — 9) Aera korbulo. — 10) Metallo. — 11) Arbo. — 12) Roko en maro. — 13) Fluidaĵo por skribo. — 14) Junipera brando. — 15) Knabo sen patro. — 16) Fandita besta graso. — 17) Purigi per akvo. — 18) Granda birdo. — 19) Ostoj en la brusto. — 20) Konstruaĵo. — 21) Nordlanda ĉefurbo.

La komencaj literoj de la vortoj formas hungaran proverbon, kiu oftege estas trafe aplikata.

Kroma demando (por eventuale dispartigi la konkurstantojn ĝajnintajn saman nombron da poentoj) : Kiam da gesamideanoj partoprenis la konkurson ?

AMUZAJ PROBLEMOJ

(Ekster la konkurso)

Solvo de la lasta problemoj :

La trovotaj vortoj estas : ŝejko, nikeli, tetrao, skisto, dinaro, ĉasisto, nankeno, ambasado, familio, jeĵuno.

La trovota frazo estas : « Bonkora, sentama, kaj ĉiel modesta, si tutkore sindonis al siaj infanoj ».

NOVA PROBLEMO : (Sro Salasc)

Silaba enigmo

Laŭ la sekvantaj difinoj, trovu 20 trisilabajn vortojn, kies meza dulitera silabo estos unu el la 20 jenaj :

BA BE BU FA FI FO GA GE GO KA KE KU LI ME MO NA RA RI

Difinoj :

1) Cefoficisto en Mekko. — 2) Larga apogseĝo. — 3) Alternativo. — 4) Hemiptera insekto. — 5) Genro de ranunkolacoj. — 6) Profesia motoristo. — 7) Juvela ŝtono. — 8) Manĝebla radikoj. — 9) Kristaleca dolĉa substanco. — 10) Luksa pokalo. — 11) Anims-tato. — 12) Optika fenomeno. — 13) Remaĉanta mamulo. — 14) Vando de buŝinterno. — 15) Manĝebla ameleca pulvoro. — 16) Surrela veturilo. — 17) Nigra lignito. — 18) Agrabla venteto. — 19) Sovaĝa arbeto. — 20) Mongola guberniestro.

N. B. — La envortigitaj silaboj ne estas en la sama ordo kiel la difinoj.

Ekzemple : BA enkorpiĝos en la vorton laŭ difino 20a.

GRAMATIKO

PER

BONHUMORO

(Deligny proponis jenan frazon : « Tiu sinjoro venis kun la panisto, kaj diris al mi, ke sia filo (= de l'sinjoro) estas malsana » — klarigante, ke, por eviti dubon, oni devus uzi « sia » por resendi al la subjekto de la antaŭa verbo. Zamenhof respondis la jenon : « La sinjoro diris al mi ke **lia** filo... »

Se li parolus pri la filo de la panistŝo, li dirus : « ke la filo de tiu ĉi (lasta)... ». « Sia filo » estas nebona, ĉar ĝi signifus « la filo de si mem » kaj neniu povas esti filo de si mem).

L. Zamenhof.
Lingvaj Respondoj.



— Ĉu Maria ne anoncis al Anna ke ŝia frato, tiu sinjoro, baldaŭ prelegos pri « Egaleco de la homoj » ?



— Kiam via fratino venis kun via edzino ŝi diris ke la patrino de tiu ĉi multe ŝatas triki. Certe ŝi pravis !



— Foje, spegulo diris al peniko, ke ĝia fideleco estas la pli granda.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (28 aŭst. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (50 fr.).

Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (7 ŝil.).

Ĉeĥoslovakio : S-ro Dezidero Koronczi, Bana Cigel, PRIEDVIDZA.

Finnlando : S-ino Kerttu Väättänen, Mäntyläntie 4, LAPPEENRANTA 5 (4,5 mk.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, Capelle aan den IJssel, ZH pĉk : 209721 (3,5 guld.).

Germanujo (Okc.) : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr, 33 - pĉk : Frankfurt (M) : 234-759 (4 mark).

Hispanujo : Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1^a, 1-a, BARCELONO (55 pes.).

Italujo : S-ro Claudio Pontedera, Via Marco Polo 3A, Verona (600 liroj).

Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO.

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBLJANA, Poŝfako 239 (900 d.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Oberst rodes veg 56, LAMBERTSEDER (7 kr.).

Danlando : S-ino Bodil Neergaard, Gothersgade 158, KOPENHAGO K (7 kr.).

Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (36 zlotoj).


Svedujo : S-ro R. Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö, Postgiro : 157007 (6 kr.).

Svislando : S-ino H. Chavan, rue Etraz 16, LAUSANNE (5 sv. fr.).

Tajlando : S-ro C.L. Unchitti, GPO Box 1231, BANGKOK (1,50 us. dol.).

Usono : S-ro C.S. Otto, 32 Hazelwood Rd., Bloomfield (N.J.) (1 dol.).

Aliaj landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (16 st.), aŭ respondkuponoj (12 respk), per libroj, aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al S-ro Micard, Epineux-le-Séguin (Mayenne), Franc.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandaĵn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncintajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo